PILO-PRESS
Interncia Informservo
N-ro 33/1972 24 okt 72
Aperas ĉiusemajne
=====================

Eŭropa Esperanto-Kongreso 1973 en LUKSEMBURGO

Mendu la dukolorajn glumarkojn ĉe Ludwig Pickel D-85 Nürnberg 1 Postfach 2113

1 folio = 10 glumarkoj : prezo -,85 GM inkl. afranko

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Esperanto en la universitato

### Sukcesa intensiv-kurso en Bielefeld

Bielefeld (PP) Kiel ni jam antaŭinformis de la 9 - 14 okt 72 okazis en la ĵus instalita lingvo-laboratorio de la lingvocentro en la universitato de Bielefeld unuafoje Esperanto-intensiv-kurso. Partoprenis 30 instruistoj kaj studentoj el Nordrejn-Vestfalio. Okaze de la kurso la radiostacio WDR disaŭdigis intervjuon kun la organizantoj. Raportis ankaŭ la gazetaro.



Im Sprachenzentrum der Universität: Esperanto-Lehrgangsleiter Hermann Behrmann (links), Verbandskassierer Wolfgang Zedler (Mitte) und der Vorsitzende Uwe Joachim Moritz. Foto: Ed. Heidmann

La partoprenantoj kun malsamaj antaŭscioj de Esperanto povis seninterrompe uzi la modernegajn instalaĵojn de la lingvolaboratorio kaj individue labori kun la 29 sonbendoj bazitaj je Esperanto programita.

Ĉiuj partoprenantoj, ankaŭ tiuj sen antaŭscioj povis paroli je la kursofino. Kvin partoprenantoj faris la lingvoekzamenon de la Germana Esperanto-Instituto.

La apuda foto montras Hermann Behrmann, la "laboratorian direktiston", Uwe Joachim Moritz (dekstre) kaj Wolfgang Zedler.

La loka kaj distrikta gazetaro detale raportis pri la kurso kaj pri la celo de la E-instruista laboro. Okaze de la kurso dpa , germana presagentejo, disvastigis per sia landa servo informon pri la E-instruado en lernejoj, kiu parte aperis sur la titola paĝo de gazetoj inter politikaj informoj, kiel montras la informo el Löhner Zeitung de la 16 okt 72.

# Bald Waffenstillstand in Südvietnam?

## UdSSR, China und Frankreich sollen angeblich Kontrollinstanz bilden

### Kairo verbietet Deutschen die Einreise

**Kairo** (dpa/AP). Acht deutsche Touristen sind am Wochenende auf dem Kairoer Flughafen abgewiesen worden, da sie keine gültigen Einreisevisa hatten. Nach offiziellen ägyptischen Angaben ist dies eine „Vergeltungsmaßnahme" für die Sicherheitsmaßnahmen auf den deutschen Flughäfen, die in Kairo als antiarabisch empfunden werden.

### Esperanto als erste Fremdsprache

**Bielefeld** (dpa). An drei Schulen in NRW soll im kommenden Jahr versuchsweise Esperanto als erste Fremdsprache eingeführt werden. Der Vorsitzende des Landesverbandes NRW Deutscher Esperantolehrer, Moritz, teilte in Bielefeld mit, für den Schulversuch sollen ein Gymnasium, eine Realschule und eine Hauptschule ausgesucht werden.

### US-Schiffe befördern ein Drittel des Weizens

**Washington** (AP). Die USA und die Sowjetunion haben am Wochenende eine Zusatzvereinbarung zu dem Getreidelieferungsabkommen unterzeichnet, nach dem die USA der Sowjetunion 17,6 Millionen Tonnen amerikanischen Weizen liefern. Die Vereinbarung sieht vor, daß ein Drittel des Getreides von amerikanischen Schiffen befördert wird.

Eldonejaj informoj (PP)

## Nova redaktoro de I P R

Interkonsente inter la estraro de ILEI kaj la eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg, kiel nova redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo (IPR) funkcias ekde n-ro 2/1972 Reinhard Haupenthal, 6602 Dudweiler, Franz-Schubert-Str. 26, FRG. La nova redaktoro nun preparas n-ron 2/72 de IPR, kiu baldaŭ aperos. Per tiu ŝanĝo la ĝisnuna redaktoro kaj iniciatinto de IPR, Helmut Sonnabend, kiu samtempe estas vicprezidanto de ILEI kaj prezidanto de AGEI, povas dediĉi sian forton kaj liberan tempon al organizaj aferoj de ILEI.

Ĉiun redaktoran materialon por IPR oni sendu al la adreso de s-ro Haupenthal. La eldonantoj de E-libroj, speciale instru- kaj lernolibroj ktp, estas petataj sendi al la redaktoro recenzekzemplerojn.

## Nova germanlingva lernolibro

Heroldo de Esperanto nun decidis eldoni la germanlingvan version de la angla lernolibro de W. Auld = Esperanto, a new approach = preparita de Reinhard Haupenthal. Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg, havos la solvendorajton por FRG kaj antaŭmendis jam 500 ekzemplerojn. La lernolibro, kies titolo estos"Esperanto einmal anders", aperos printempe 1973.

## Post la kurso rehavebla

Ekde la 8 nov 1972 denove estos liverebla, en la eldonejo de Ludwig Pickel, la daŭriga lernolibro por germanoj de Wingen, Post la kurso, kiel fotorepreso. La prezo restas senŝanĝe 4,60 GM. La ŝlosilo kostas 1,20 GM. Mendojn jam nun akceptas Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

## Glumarko Eŭropa Kongreso Luksemburgo 1973

Interkonsente kun la organiza komitato de la Eŭropa Esperanto-Kongreso Luksemburgo 1973 eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg, eldonas dukoloran glumarkon, memgluan, sur folioj kun po 10 glumarkoj. Mendu jam nun!

| | | | |
|---|---|---|---|
| La prezo estas | 1 folio kun 10 glumarkoj | = | -,85 GM* |
| | 5 folioj | = | 3,50 GM* |
| | 10 folioj | = | 5,50 GM* |

*inkluzive de afranko

Plej simpla mendo estas pago de la koncerna sumo al Ludwig Pickel, Sonderkonto, 85 Nürnberg, PSchK Nürnberg 214496 indikante "glumarkoj".

## Heroldo de Esperanto 1973

Laŭ informo de la eldonejo la abonkotizo 1973 de Heroldo de Esperanto estas 20,- GM. Abonojn por Heroldo ankaŭ akceptas Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg.

**********

## SAT - Kongreso 1973

Toronto (PP) La 46-a Kongreso de SAT okazos de la 30 jul-6 aŭg 1973 en la kanada urbo Toronto. Invitas la SAT-Rondo de Toronto sub la adreso: Esperanto, P.O.Box 246, Station "F", Toronto,Ontario, Kanado.